 MINNEAPOLIS: Chas. D. Blaker, R. F. D. 1, Station F.  
 ST. PAUL: E. J. McKinney, 405 Charles St.  
 WINONA: Thomas B. Hill, 309 East Fifth St.
- MISSOURI  
 ST. JOSEPH: Mrs. Josephine Riley, 807 N. 22nd St.
- MONTANA  
 ANACONDA: Miss Bertha E. Ware, 514 Oak St.  
 MISSOULA: Harry C. Walsh, care M. M. Co.
- NEBRASKA  
 OMAHA: Mrs. W. B. Howard, 4722 Capital Ave.  
 OMAHA: Esperanta Rondo, Mrs. R. B. Elliott, 823 Park Ave.  
 NEBRASKA CITY: J. T. Morey  
 ORD: First Nebraska Esperanto Club, Mrs. E. A. Russell
- NEVADA  
 SEARCHLIGHT: Dr. E. W. Newell
- NEW JERSEY  
 HAMMONTON: Miss Laura K. Seguire
- NEW MEXICO  
 TREMENTINA: Miss Alice D. Blake
- NEW YORK  
 AUBURN: Clarence F. Welsh, Recorder's Office  
 BROOKLYN: Mrs. H. D. King, 287 De Kalb Avenue.  
 CHAUTAQUA: Rev. S. H. Day
- OHIO  
 OHIO ESPERANTO ESPERANTO ASSOCIATION: H. S. Blaine, Box 999, Toledo  
 CLEVELAND: Miss Carrie Southard, 1432 Highland Ave.  
 COLUMBUS: Esperanto Club of Ohio State University; Miss Emma Bower  
 PERRYVILLE: L. S. Van Gilder  
 TOLEDO: H. S. Blaine, Box 999
- PENNSYLVANIA  
 BETHLEHEM: Lehigh Valley Esperanto Society; Chas. W. Rauch, 57 Spring Street  
 PITTSBURGH: Kenneth C. Kerr, 1100 Allegheny Ave.  
 GROVE CITY: J. B. Weaver, 311 Jackson St.  
 OIL CITY: Mrs. J. R. Adams, 123 Wyllys Ave.  
 WESTFIELD: Lloyd R. Watson, Cowanesque, Pa.  
 ERIE: La Espero Club, Miss Mamie Leo
- OHIO  
 CINCINNATI: Grover Peacock, 3449 Wilson Ave., Avondale, Cincinnati  
 CINCINNATI: Esperantista Grupo, Miss Mathilde Lamboir, 11 Bella Vista  
 MASSILON: Legendary Lore Club, Miss Nellie Evans
- OREGON  
 McMINNVILLE: Arthur McPhillips  
 PORTLAND: Rose City Esperanto Club, Chas. C. McDonald, 292 Weidler St.
- SOUTH DAKOTA  
 DE SMET: Vincent M. Sherwood
- WEST VIRGINIA  
 SHEPHERDSTOWN: Shepherd College Esperanto Society  
 Prof. Carl W. Littler  
 WHEELING: Geo. B. Wilson, Nat. Bank of West Virginia
- VIRGINIA  
 NORFOLK: Jamestown Esperanto Club, Leo V. Judson, 101 Wood St.  
 LAKE BAY: Home Esperanto Club, Fred Rivers  
 OLYMPIA: Miss Georgia Melville, Pacific Seminary  
 SEATTLE: Victor A. Welman, Youngstown Station  
 SPOKANE: R. Kerkhoven, care Inland Printing Co.  
 TACOMA: J. L. Wood, care Acorn Printing Co.
- WISCONSIN  
 MILWAUKEE: Chas. A. Vilas, Box 883  
 MENOMINEE FALLS: W. H. Rintelman  
 PORTAGE: Rev. J. I. Cleland




## THE OHIO ESPERANTO ASSOCIATION

ONE of the most important practical results of the Chautauqua Congress is shown in the organization of different state associations. The impetus given to propaganda there is bearing good fruit. Immediately following the Congress the West Virginia Esperanto Association was organized, on the occasion of the Moundsville Chautauqua. Ohio now comes to the fore with a strong organization, determined to see to it that "la afero" receives its full share of attention from the public in that state.

During the sectional meetings on Wednesday of the Congress a committee composed of Dr. Ivy Kellerman, of Columbus, Harry S. Blaine, of Toledo, and Walter S. Dute, of North Am-

by the strengthening of already existing organizations, and by all possible propaganda work, *including the permissive teaching of the language in the public high schools of the state.*"

Apropos of this last object there was introduced in the Ohio General Assembly during its last session a measure providing for the teaching of the language as an optional study in the high schools, but owing to the rush of work incident to the closing days of the legislature the bill was not acted upon by the House, although passed in the Senate. Mr. Ampt is authority for the statement that the bill will be reintroduced during the next session of the Assembly, under the auspices of the Association, when all possible pressure will be



W. M. AMPT



DAVID PEACOCK

herst, was appointed by the Ohio delegates present to prepare a constitution for a proposed Ohio association, and to submit same together with a list of officers to clubs and groups throughout the state, for their approval.

After the Congress the Committee commenced its work; from various state associations constitutions were secured, and these formed the basis of the Ohio fundamento. Good points were adopted, and those that seemed not good, or cumbersome, were rejected. Some original features were introduced, one of which will be found in the following paragraph.

The objects of the Association as stated in Article II of the Constitution are "to promote the study and use of the international language, Esperanto, throughout the state, by the formation of clubs, groups, and classes,

exerted for its passage. The bill of last year was introduced by Senator Harper, of Cincinnati, and was prepared by Mr. Ampt.

The officers of the Association as approved for the year 1908-9 are: President, W. M. Ampt, A. B., LL. B., Cincinnati; first vice president, Edward Kibler, LL. B., Newark; second vice president, Miss Tillie M. Lambour, Cincinnati; secretary-treasurer, Harry S. Blaine, Toledo. Councilors: Arthur A. Smith, Van Wert; John H. Vich, Cleveland; Walter S. Dute, N. Amherst; H. P. Barnes, D. D., Columbus; G. A. Billow, D. D. S., Dayton.

It is the intention of the Association to name a number of the eminentuloj of the state as honorary Vice-Presidents, thus giving the organization a high standing before the public. The acceptance of a number of these has

been secured, but the announcement of the complete list will be deferred until later. The list of patrons will include persons in all walks of life, and of all creeds, as illustrating the neutrality of Esperanto and its faculty of bringing people together.

It was with great regret that Ohio Esperantists learned of the intention of Dr. Kellerman to leave the state, to engage in work in Illinois. Her help in the formation of the Association was most valuable. Credit is also due to Mr. Kenneth C. Kerr, Secy. of the Pittsburgh Esperanto Club, and to Mr. Herbert M. Scott, Councilor of the E. A. of N. A., for their help and advice in the elaboration of the constitution.

The Ohio Esperanto Association will endeavor to systematize the efforts of individual workers throughout the state in the propaganda of Esperanto. It will aim to become a center of activity around which will grow up a virile body of samideanoj who will spread the doctrine to the uttermost parts of the state, and which will secure for the movement the stand-

that the Association should affiliate with the Esperanto Association of North America, requiring all its members to join that body. The following officers were elected: President,



DR. CLARA TODSON

Dr. Clara Todson, Elgin; vice-president, Rev. Floyd B. Hardin, Moline; secretary-treasurer, Edwin Perry, Elgin; councilors: J. Howard Pearson, Belvidere; Prof. Clark, Urbana.



HARRY S. BLAINE

ing and importance before the public which it deserves.

All Ohio Esperantists should give the new organization their hearty support by a prompt affiliation and coöperation.

#### ILLINOIS ESPERANTO ASSOCIATION.

This society held its annual meeting at the Great Northern Hotel in Chicago Monday, October 26th. The most important business besides the election of officers was a decision

CLEVELAND, OHIO.—A large club was recently formed in Cleveland, with Miss Carrie Southard, of 1432 Highland Avenue, as the corresponding officer.

MINNEAPOLIS.—The *Minneapolis Esperanta Klubo* was organized on Monday, October 26th. The local paper, in reporting the event, says that about forty people were present, and the following officers were elected: President, C. H. Briggs; secretary, Rev. Charles D. Blaker; treasurer, E. T. White. It is proposed to establish eight classes in Minneapolis for the propagation of Esperanto, and the *Minneapolis Esperanta Klubo* will be the central organization in the movement.

MOUNT VERNON, NEW YORK.—The Edelweiss Chautauqua Circle is studying Esperanto, and at the regular meetings of the Circle the Esperantist members come half-an-hour early to hold a session in Esperanto.

MANCHESTER, N. H.—The Manchester Institute of Arts and Sciences gives one of its rooms for the study of Esperanto—a fact which seems to bear much weight with the people of that town. The Manchester club is constantly growing in size and enthusiasm. The Manchester Traction, Light and Power Company recently printed one of its advertisements in Esperanto. The *Mirror* and the *Union*, local papers which have for years

been widely quoted in the United States, give much space to Esperanto matters.

**ST. LOUIS.**—The St. Louis Esperanto Society was formed Tuesday, October 22, and has among its charter members some very prominent and influential people of the city. The first meeting was held in the rooms of the Missouri Historical Society. The following are the officers: President, Dr. John Lausch; secretary and treasurer, Henry Cho-teau; librarian and corresponding secretary, Miss Mary Ketchum.

**BOSTON.**—The Boston Esperanto Society gives free lessons twice a week at the English High School. There are lessons for beginners at 7:30 p. m., and advanced classes at 8:30. The first meeting of the Boston Society took place October 15th, when a large proportion of the members were present and the outline of the work for the coming winter was prepared. The Society voted to join the Esperanto Association of North America. An ingenious scheme for arousing interest in Esperanto by the establishment of a permanent class was put forward by one of the members. He had already applied the scheme with great success, which was done in the following manner: A free lecture on Esperanto was given in a church. At the close of the lecture it was stated that a course of twelve lessons would be given upon the following conditions: At least six persons must apply, and the charge for the course would be \$2.50 apiece. For this every one would receive a year's subscription to *AMERIKA ESPERANTISTO*, a copy of the American Esperanto Book, membership in the E. A. of N. A., and ten cents for every lesson he might attend. On these terms there was no difficulty in getting a class of over thirty members. We commend the plan to other propagandists. We should like to hear of still other plans for forming permanent classes and groups.—**J. F. TWOMBLY, Councilor for New England.**

**WICHITA, KANSAS.**—An Esperanto class has been formed under the leadership of Miss Viola Kinkead, 913 North Lawrence Avenue. The *Beacon* of October 24th has a column report and interview with Miss Kinkead.

**FAY, NEVADA.**—An indirect report, received through the Theosophical Esperanto League, says that Mrs. McGovern, the League's active agent at Fay, has succeeded in having Esperanto introduced into the public schools at that place.

**SEATTLE.**—The Seattle Esperanto Society held its regular yearly convention the 17th of September and elected the following officers: President, Chas. E. Randall; vice-president, Miss Florence Tarrant; secretary, Victor A. Welman. Twenty new members joined the club and classes were arranged for weekly instruction by Mr. Randall. The Seattle Club, with the help of the clubs of Portland, Tacoma, Spokane and other places, will arrange for

a convention to be held during the Alaska-Yukon-Pacific Exposition the coming summer, and also for the founding of a Northwestern Esperanto Association, after the plan of the E. A. of N. A. All Esperantists in Oregon, Washington and Idaho are requested to send their names to Mr. Welman, care D. S. Johnson Music Co., Seattle, and receive a circular about the matters.

**PORTLAND, MAINE.**—The Portland Esperanto Society has elected Dana W. Fellows *konsulo*. A *konsulo*, by the way, is a person who has a permanent day address, keeps on hand information about Esperanto, and most important of all, is the source of aid and comfort to the stranger Esperantist who happens to visit the city and knows the address of the consulate.

**TACOMA.**—A private Esperanto club called *La Kvaro* was organized in Tacoma in 1907. The membership is limited, as the name indicates, and includes Misses Tekla Anderson, Ida M. Wendell, Messrs. Frank Lief and Lehman Wendell. The club holds meetings once a week, is using *Unua Legolibro* and translating Aesop's fables.

**EVANSVILLE, INDIANA.**—Secretary E. Moggs of the Y. M. C. A. has decided to have regular classes in Esperanto for the Y. M. C. A. boys during the winter. The president of the Indiana Esperanto Association, Mrs. Winifred Sackville Stoner, has conceived the idea of placing *AMERIKA ESPERANTISTO* and the American Esperanto Text Book in every public library in Indiana. The librarians further are to be furnished with propaganda leaflets which they are to distribute free to those asking for information. Such a bureau of information has been opened for the past few weeks at Evansville's Public Library and has aroused much interest in Esperanto. Mrs. Stoner suggests that this plan be adopted by the officers of all state organizations, or if this is not possible, that *samideanoj* all over the United States should make sure that the official magazine and Mr. Baker's text book should be placed in the public library of the towns in which they live.

**WASHINGTON, D. C.**—A committee composed of Major Straub, Dr. Wm. J. R. Thonssen, J. W. Cheney and Chas. W. Stewart drafted a strong memorial to the Anti-Tuberculosis Congress on the use of Esperanto in certain official documents. This has been delivered to the president of the Congress and its consideration will be urged in every way possible between now and the next convening of the Congress. Esperantists who are members of that body or who have influence with any of its members should not forget that this is an important field of work.

**MILWAUKEE.**—A temporary organization of Esperantists has been effected in Milwaukee, and a meeting is soon to be held with every prospect of organizing on a permanent basis



AN ESPERANTO CLUB IN THE WOODS OF MINNESOTA

a large club. Chas. A. Vilas of Milwaukee, whose address is Post Office Box 883, is cooperating with Rev. J. I. Cleland of Portage in the formation of a state society.

UTICA.—At the State Federation of Women's Clubs November 10th an address on Esperanto was given by Anna Maxwell Jones, of New York City.

DETROIT.—Dr. H. W. Yemans, the well-known Esperantist of the government service, now stationed at Fort Wayne, Detroit, is endeavoring to organize the Esperantists of that city. An October issue of the *News Tribune* contains a half-page article on Esperanto and invites those interested in forming a club to communicate with Dr. Yemans.

COLORADO.—Dr. James Underhill, president of the Colorado Esperanto Association, is supplying a series of lessons in Esperanto to the *Idaho Falls Times*, a paper which gives many other evidences of life and up-to-date-ness besides its Esperanto department.

PHILADELPHIA.—The Philadelphia Esperanto Society re-organized for the year's work on October 20th, and elected the following list of officers: President, Ward Nichols, 652 Bullitt Building; vice-president, Dr. E. D. Burleigh, 1613 Green St., recording secretary and treasurer, Miss Alice Potter Ervin, 2225 North College Avenue; corresponding secretary, Mrs. M. H. Lee, 4022 Green St., hon-

orary president and director of instruction, Prof. A. M. Grillon, 1221 S. 57th St.; councilors: Henry W. Hetzel, Moylan, Penna.; J. W. McGinley, 1937 East Cumberland St.; Peter Reilly, 133 North Thirteenth St.; H. E. Rambo, 2044 North Thirteenth Street. The club held an Esperanto Rally on November 10th and is distributing large quantities of advertising matter in the city. The president



PROF. A. M. GRILLON

of the Philadelphia club, Mr. Nichols, is one of the most tireless and persistent Esperantists in the country and has given many lectures in New Jersey. Like many others with a Philadelphia business address, his home is Atlantic City, and in addition to the inconvenience of doing Esperanto work o' nights in Quaker City, he has even resigned his position with the B. P. O. Elks! Prosperu la Filadelfia!

## EDWARD K. HARVEY

**E**DWARD K. HARVEY, of Boston, Treasurer of the Esperanto Association of North America, died October 27, 1908, from diphtheria and typhoid fever. He had been ill about three weeks.

Mr. Harvey was born in 1881 at Carrick-on-Shannon, Ireland. He was of English and Scot parentage, his father being an officer in the British army. His family came to Nova Scotia while he was a boy and there he received his education. He graduated in 1901 from Dalhousie College, Halifax, with the degree of B. A. and with high honors in philosophy. He taught one year in Topsfield, Mass., and then for five years at the Perkins Institution for the Blind, Boston. Last year he studied at the Massachusetts Institute of Technology, where he did so well that he had received a scholarship for the present year. During the past two summers he had been one of those in charge of the Boys' Camp at Becket, Mass.

Mr. Harvey was only 27 years old. He was a comparative stranger in this country, and had therefore no particular political or social influence. He was a poor man, being obliged to work for his own living, and yet at the same time to save money for his education. He had enough to do without taking up the study of Esperanto and becoming one of its most active propagandists in this country. This, in spite of all his other work, he certainly was, and a propagandist of the very best kind—no mere dreamer—but one who inspired confidence in his hearers. He knew Esperanto, he realized its value and he was able to make others realize this, too. Unconsciously they received the idea that there must be something in Esperanto, or it would not have made so deep an impression on so "level-headed" a man.

Mr. Harvey first became acquainted

with Esperanto about five years ago from an advertisement of a shilling text-book in an English journal. He bought this book, studied the language diligently, obtained some real knowledge of it, used it in correspondence with foreigners and then began to let others know about it. He started a little class among the blind boys at Perkins Institution; with one or two others he founded the Boston Esperanto Society.

For the last four years he has been a very active worker "por nia afero." He has taught free classes, has given lectures and has answered many letters asking for information. Wherever he worked or happened to be—Perkins Institution, Boys' Camps, Institute of Technology—he has not merely been ready to answer questions and to help beginners. That was not enough for him; he thought that it was his business to arouse interest, to make every one *wake up* to the importance of Esperanto. And he did this without any "fanfaronado"—simply, affably, but with a steady persistence that in the end generally obtained what he wanted. His greatest triumph was the introduction of Esperanto as a subject of study, to be taught by one of the regular instructors, in a conservative college such as the Massachusetts Institute of Technology.

In the summer of 1907, he attended the Third Congress of Esperantists in Cambridge, England. Three blind delegates from this country went with him to that Congress. After the Congress, he visited South Russia, where he spent several weeks, and where he used only Esperanto. He taught a group of Russian Esperantists how to play American football; and he introduced Esperanto into the great school for the blind at Kief. He obtained some very interesting photographs on his visit to Rus-

sia. These he exhibited at the Chautauqua Congress last summer, where many readers of the *Esperantisto* must have heard him and had the pleasure of meeting him.

Officially, Mr. Harvey has been an

did more than his share of the work and yet he never seemed to think that he had done anything but his duty.

We Esperantists have lost in him the best type of a propagandist, and the Association a capable officer. But to



EDWARD K. HARVEY

examiner for the *Atesto pri Kapableco*, Secretary of the Boston Esperanto Society, Secretary-Treasurer of the American Esperanto Association and Treasurer of the Esperanto Association of North America. In all these positions he proved his great value. He was always to be depended upon, he always

those who had a share in his friendship, the loss is far greater. The mere chance acquaintance regrets the passing away of a character so fair-minded, so simple in its integrity; we, his friends, mourn for one whom we know to be in the best sense a Christian soldier, a man—*viro*.

JOHN FOGG TWOMBLY.

## POR LA KOMENCANTO

This department is edited by Edwin C. Reed, principal of The American School of Esperanto. Send inquiries to Mr. Reed, care of this magazine

How shall I translate the English word "occasionally" in the sense of "some times? Can *okaze* be used to translate this?

*Okaze* may be used to translate this in some cases, but means rather "by chance," containing the idea of a single happening instead of repeated action. *Okazo* is the translation for "chance," "occurrence," "opportunity." By far the better word for "occasionally" is *iafoje*. Can the verb *preni* have as wide a scope of meaning in Esperanto as "to take" has in English? Is it correct to say *Mi prenis la vagonaron* for "I take the train?" Likewise would "*Mi kaptis la vagonaron*" be a possible translation for "I caught the train?"

*Preni* is very generally used, but not so freely as in English. The meaning of the English should be grasped and this, rather than the words themselves, translated into Esperanto. For instance "to take leave" is correctly rendered *diri adiaŭ* or simply *adiaŭi* but "to take notice" would be *atenti pri* or *atente rigardi*, or simply *noti*. The correct translation of "I take the train" is *Mi envagoniĝas*. The verb *forveturi* may also be used in this sense. It is not good Esperanto to say *Mi kaptis la vagonaron* for "I caught the train." The word to be chosen is *trafi*, literally meaning "to attain one's goal," "reach one's aim," etc., thus: *Mi trafis la vagonaron*.

In Motteau's Esperanto-English dictionary I note that *neniigi* is said to mean "vanish," while in Rhodes' dictionary the

only word given for this English meaning is *malaperi*. Which is right?

*Neniigi*, as is apparent from its formation, means literally "to become nothing," and in that sense to "vanish," but could scarcely be used except in a figurative sense, and in regard to ghosts and other vapors. *Malaperi* would be the more usual word to employ in translating "disappear," "vanish."

To what length may one go in the formation of compound words? Is it allowable to join several words together if the meaning is apparent?

While in theory there is no limit to the possibilities of word-composition, it is advisable in practice to keep the compounds sufficiently short that their meaning may be grasped at once, without any necessity of hesitating to see just what letter begins each succeeding element of the compound. Six or seven syllables is usually quite as long a word as is admissible at all. Longer compounds may naturally be used in writing than in speaking, since in the latter ease of pronunciation and rapidity of comprehension are important.

### READING EXERCISE

El angle tradukis DAVID WILLIAM PEACOCK

Antaŭ multaj jaroj, saĝa kaj bona reĝo kies nomo estas Alfred, vivis en Anglujo. Neniu alia viro iam faris tiel multe kiel li por sia patrujo; kaj la homaro en la nuna tempo parolas pri li kiel "Alfred, la Granda."

La vivo de reĝo, tiam ne estas feliĉa. Estis militoj preskaŭ ĉiam kaj neniu

krom li povis konduki la militistaron en batalon tiel bone kiel li. Kaj tial, per regado kaj batalado, li estis ĉiam okupata. Unu kruelega kaj malĝentila popolo, la dana el Danujo estis veninta de trans la maro, kaj estis batalanta la Anglojn. Dum longa tempo la Danoj estis la venkantoj en ĉiuj bataloj ĉar ili estis tiel multaj kaj tiel maltimaj kaj fortaj. Se ili daŭrus tiel, ili baldaŭ estus la mastroj de la tuta lando.

Fine, post granda batalo, la Angla militistaro venkiĝis kaj disĵetiĝis. Estis necese ke ĉiu savu sin mem se li povis. Reĝo Alfred forkuris sole, lasinte la teron la arbaroj kaj la marĉejoj.

Dum la malfrua parto de la tago, la reĝo venis al dometo de arbhakisto. La reĝo estis tre laca kaj malsata, kaj li petis la edzinon de la arbhakisto ke ŝi donu al li ion por manĝi, kaj lokon por dormi en sia dometo.

La virino tiam estis bakanta kelkajn kukojn sur la fajrujo, kaj ŝi rigardis kun kompatato la malfeliĉan ĉifonulon kiu ŝajnis tiel malsata. Ŝi ne sciis ke li estis la reĝo.

"Jes," diris ŝi, "Mi donos al vi vespermanĝon se vi gardos tiujn ĉi kukojn. Mi deziras iri por melki la bovinon, kaj vi devas ne permesi ke ili brulu dum mi."

Reĝo Alfred tre volis gardi la kukojn, forestas."

sed li devis pensi pri aferoj kiuj estis pli gravaj. Kiel li povos kolekti la militistojn por fari alian militistaron? Kaj kiel li povos forpeli la kruelegajn Danojn el sia lando? Li forgesis sian malsaton; li forgesis la kukojn; li forgesis ke li estis en la dometo de arbhakisto. Li estis faranta planojn por la morgaŭa tago.

Post kelke da minutoj, la virino revenis. La kukoj estis fumigantaj sur la fajrujo. Ili estis brulitaj nigre. Ha! Kiel kolera estis ŝi!

"Mallaboremulo," ekkriis ŝi. "Rigardu tion, kion vi faris! Vi deziras havi ion por manĝi, sed vi ne deziras labori!"

La reĝo estis tre malsata, kaj tial li ne pensis malfavoreble pri tio kion la virino diris sed li malĝojis pro la perdo

de la kukoj.

Oni ne scias ĉu li havis ion por manĝi, je tiu nokto aŭ ĉu li devis enlitiĝi sen ia vespermanĝo.

Sed nur malmultaj tagoj pasiĝis ĝis li kolektis siajn militistojn kaj venkis la Danojn en granda batalo.

#### TEKSTO KUN TRADUKO

"Por vivadi kontente kun malgrandaj rimedoj; por serĉadi la elegantecon plivole ol la lukson, kaj la bon-manierecon plivole ol la modon; por esti inda, ne respektinda;—kaj menso-riĉa, ne monarĉo,—por studadi forte, pensadi trankvile, paroladi dolĉe, agadi sincere; por aŭskultadi al la voĉoj kaj birdoj, infanetoj kaj saĝuloj, kun malferma koro; por suferadi ĉiun gaje, faradi ĉiun kuraĝe, atendi okazojn, rapidi neniam; por unu vorto, por lasi la spiritajn, neinvititajn kaj nekonsciajn elkreski tra la ordinara; ĉi tio estos mia simfonio."—Traŭdukis *W. L. Church, Boston.*

To live contentedly with small means; to seek elegance rather than luxury, and refinement rather than fashion; to be worthy, not respectable,—and wealthy, not rich; to study hard, think quietly, speak gently, act frankly; to listen to stars and birds, babes and sages, with an open heart; to bear all cheerfully, do all bravely, await occasions, hurry never; in a word, to let the spiritual, uninvited and unconscious grow up through the common;—this is to be my symphony.—*William Henry Channing.*

#### TAGIĜO.

Silente venas la tagiĝo  
Sur flugiloj de la suno;  
Longaj ombroj malaperas,  
Frat' fantomaj de la nokto.

Nun ekbrilas la sunlumo  
Kaj enserĉas la ĝardenojn,  
Trovante tie solan rozon,  
Forkisas ĝiajn rosajn larmojn.

—*Edith Haws.*



# LITERATURO

## BONĈJO ŜVAJG<sup>a</sup>

Laŭ la jidiŝa de J. L. Peretz, tradukis

MAX BRODKEY

**C**I TIE sur tiu ĉi mondo, la morto de Bonĉjo Ŝvajg kreis nenian enpremon. Kiu zorgis pri tio, kiu li estis, kiel li vivis, kio kaŭzis lian morton, ĉu lia koro diskreviĝis, ĉu liaj fortoj lin forlasis, ĉu la vertebro rompiĝis sub peza ŝarĝo! Kiu scias, eble li mortis de malsato!

Se ĉevalo falus oni sin pli multe interesigus, la ĵurnaloj priskribus, centoj da homoj kunkurus de ĉiuj stratoj kaj rigardus la kadavron, eĉ rimarkus la lokon kie la falaĉo okazis. Sed ĉevalo ankaŭ ne estus tiel prizorgita se estus tiom da ĉevaloj kiom da homoj, mil milionoj!

Bonĉjo kviete vivis kaj kviete mortis. Kiel ombro li pasis tra nia mondo.

Je la Bonĉja naskiĝsoleno oni ne trinkis vinon, pokaloj toaste ne tintis, je sia konfirma soleno li belvoĉe ne traktatis. Li vivis kiel griza sablereto sur la bordo de la maro inter milionoj da similuloj. Se la vento ĝin ekblovus kaj transpelus al la antaŭbordo de la maro neniu ĝin notus. Dum vivo la malseka striata kotaĵo nenian piedsignojn retenis de li. Post la morto la vento faligis la tabuleton ĉe la tombo, la enterigistedzino trovinte ĝin malproksime kuiris per ĝi poton da terpomoj. Nur tri tagojn post la morto kaj la enterigo jam forgesis kie li kuŝigis lin.

Se Bonĉjo havus tombŝtonon eble post cent jaroj antikvisto ĝin trovus kaj la nomo, "Bonĉjo Ŝvag" iafoje ree eksonus tra nia aero.

Ombro, lia bildo restis en nenies cerbo, en nenies koro restis memoraĵo pri li.

Seninfana; senbesta.

Sole li vivis kaj sole li mortis.

Se ne pro homa tumulto iu eble aŭdus la ekkrakon de lia dorso sub la peza ŝarĝo. Se la mondo ne estus tiel okupata iu eble notus ke Bonĉjo (ankaŭ homo) dum sia vivo havis du velkintajn okulojn, kaj terure enfalintajn vangojn, ke eĉ kiam li estis sen ŝarĝo sur la ŝultroj, lia kapo ankoraŭ estis teren klinita kvazaŭ li dum la vivo sian tombon serĉis. Se estus tiel malmulte da homoj kiel da ĉevaloj oni eble iam demandus kien Bonĉjo foriĝis.

Kiam oni envenigis Bonĉjon al la malsanulejo lia angulo en la kela loĝejaĉo ne restis senokupa; deko da similuloj senpacience atendis por ĝi. Kiam oni forportis lin de la lito al la mortintejo dudek malriĉuloj atendis por lia lito. Kiam li forlasis la mortintejon oni enportis dudek mortintojn el sub rompaĵoj de falinta domo.

Kiu scias kiel longe li restos pace en la tombo? Kiu scias kiom da similuloj atendas por lia spaceto?

Kviete naskita, kviete vivis, kviete mortis kaj pli kviete estis enterigita. Sed ne tiel okazis en la alia mondo. Tie la morto de Bonĉjo kreis grandegan enpremon.

La Mesia Seforo<sup>b</sup> eksonoris tra ĉiuj sep ĉieloj, "Bonĉjo Ŝvajg mortis." La plej grandaj anĝeloj kun la plej larĝaj flugiloj flugis kaj anoncis unu al la alia "Bonĉjo estas envokita de la ĉiela tribunalo."

<sup>a</sup>"Ŝvajg" jidiŝe signifas *ŝienti*.

<sup>b</sup>Ŝafovira korno.

En la ĉielo bruas, ĝoje, malorde. "Bonĉjo Svajg? Ĉu vi ne aŭdis pri Bonĉjo Svajg?"

Anĝelidoj kun diamantaj okuletoj, orfadenaj flugiletoj kaj arĝentaj pantofletoj kuris antaŭ Bonĉjo kun ĝojo, la bruo de la flugiloj, la frapado de la pantofloj kaj la ĝoja ridado de la junaj, freŝaj, rozaj buŝetoj plenigis la tutajn ĉielojn kaj atingis ĝis la dia trono kaj Dio mem jam eksciĝis ke Bonĉjo estas alveninta.

Abramo, nia patro, starigis sin ĉe la ĉielaj pordegej kaj etendis sian dekstran manon kaj dolĉa rideto disvastiĝis kaj hele brilis sur lia maljuna vizaĝo kiam li laŭte elparolis: "Pacon al vi."

Kio muĝas tiel en la ĉielo? Du anĝeloj enruligas oran tronon sur radetoj en la Edenon.

Kio tiel hele ekfulmis? Oni preterportis oran kronon ornamitan per multekostaj ŝtonoj. Ĉio por Bonĉjo.

"Ankoraŭ antaŭ la dekreto de la ĉiela tribunalo?" Demandis kun miro la iom ĵaluza sanktularo.

"Ho," estis la anĝela respondo, "tio estos nur nesignifa ceremonio, kontraŭ Bonĉjo Svajg eĉ la prokuroro mem ne trovos vorteton en sia buso la tuta proceso ne daŭros pli ol kvin minutojn." Ho! ĉu estas bagatelaĵo Bonĉjo Svajg? Tiam la anĝelidoj kaptis Bonĉjon en la aero kaj ekludis belsonan himnon por li, kaj Abramo, nia patro, prenis lian manon kvazaŭ de longe konata kamaŝado. Kiam li aŭdis ke lia trono jam atendas lin en Edeno, ke krono atendas lian kapon kaj ke en ĉiela tribunalo neniu diros eĉ vorteton kontraŭ li, Bonĉjo same kiel surtere silentis de timo. Lia koro sveniĝis. Li estis certa ke li nur sonĝas aŭ eraras. Li estis kutimiĝinta je ambaŭ. Foje li surtere sonĝis ke li rikoltas monerojn de la planko. Tutaj trezoroj kuŝis tie kaj ekvekiĝinte li trovis sin pli malriĉa ol hieraŭ. Foje oni erare ekridetis aŭ ellasis bonan esprimon al li sed ekkoninte lin deturniĝis kaj ekkraĉis.

"Mia sorto," li pensis, "estas tia."

Kaj li timas levi siajn okulojn, por ke la sonĝo ne forlasu lin. Eble li ekvek-

iĝinte sin trovas ie en kaverno inter serpentoj kaj skorpioj. Li timas ellasi soneton el la buŝo, movi membron por ke oni ne rekonu lin kaj forĵetu al "Kaf Hakola."<sup>e</sup> Li tremadas kaj ne aŭdas la anĝelajn komplimentojn, ne rigardas la dancadon ĉirkaŭ li, ne respondas al Abramo, nia patro, je lia kora saluto, "Pacon al vi," kaj ne salutas la ĉielan tribunalon.

Li estas ekster si de timo kaj lia timo pligrandiĝis kiam li nevole ekvidis la plankon de la ĉiela tribunalo—pura alabastro kaj diamantoj.

"Sur tia planko staras miaj piedoj," li fariĝis tute timigita. "Kiu scias kiun riĉulon, kiun rabenon, kiun sanktulon oni intencas alvenigi, kaj fariĝos malluma finiĝo por mi."

De timo li ne aŭdis kiam la prezidanto elvokis "La proceso de Bonĉjo Svajg" kaj transdoninte la dokumentojn al la defendanto diris "legu, sed mallongiĝu."

Ĉe Bonĉjo turniĝas la tuta ĉambrego, muĝas en liaj oreloj, tamen tra la muĝado li aŭdas pli kaj pli klare la dolĉan kiel violono voĉon de la anĝelo defendanto.

"Lia nomo," li aŭdis, "taŭgis por li kiel vesto al gracia figuro arte aranĝita de artista tajlora mano."

"Kion li babiladas?" pensas en si Bonĉjo, aŭdante kiel senpacienca voĉo interrompas la defendanton kaj diras, "Sen paraboloj, mi petas."

"Li neniam," denove komencas la anĝelo, "pro neniu plendis nek pro Dio nek pro homoj en liaj okuloj iam ekbrilis flamo de malamego, li neniam levis ilin kun plendo al ĉielo."

Bonĉjo ree ne komprenas eĉ unu vorteton kaj la severa voĉo denove interrompas, "Sen retoriko, mi petas."

"Jobo ne eltenis, sed Bonĉjo estas estinta la pli malfeliĉega."

"Faktojn, nur nudajn faktojn!" ekkrias pli malpacience la prezidanto.

"Je la oka tago li estis solentranĉita—"

"Sen realismo, mi petas."

<sup>e</sup>Speco de hebrea infera turmento.

“La tranĉisto, sentaŭgulo, ne detenis la sangon—”

“Cetere.”

“Li silentadis,” daŭrigas la anĝelo defendanto, “eĉ kiam lia patrino mortis kaj je dektria jaro li ricevis duonpatrinon—vera serpento, malbonemulino.”

“Sajnas do ke oni pri mi preparolas,” pensas Bonĉjo.

“Sen aludoj pri neĉeestantaj personoj,” ekkoleriĝis la prezidanto.

“Ŝi avare donis al li nur prahieraŭan ŝimintan panon, ostojn anstataŭ viando, kaj ŝi mem kafo kun kremo trinkis.”

“Al la temo!” ekkrias la prezidanto.

“Sed ŝi ne ŝparis siajn ungojn, kaj lia brunblua haŭto elrigardis el la ŝimintaj ĉifonaĵoj. Vintron en la diskrevigantaj frostoj li nudpiede sur la korto hakis lignon kaj liaj manoj estis tro junaj kaj delikataj, la lignaĵetoj tro dikaj, la hakilo malakra. Ne nur unufoje okazis ke lia mano el artikulo elturniĝis, ofte al li frostiĝis la piedoj, sed li silentis, eĉ antaŭ lia patro—”

“La drinkulo!” ekridis prokuroro kaj al Bonĉjo malvarmiĝas la tuta korpo.

“Ne plendis,” finis la defendanto sian frazon.

“Kaj ĉiam sola,” li daŭrigas, “sen kunulo, sen lernejo, sen vestaĵo, sen libera minuto—”

“Faktojn,” denove elvokas la prezidanto.

“Li silentis eĉ post kiam la patro ebrie en unu akra vintra nokto tordinte liajn harojn elĵetis lin el la domo. Li kviete levis sin el la neĝo kaj forkuris kien liaj okuloj lin portis.

“La tutan vojon li silentadis. Kaj eĉ en malsatego li nur per okuloj almozpetis. En unu diafana malseka printempa nokto li envenis en urbegon. Kvankam li envenis kiel guto en la maron, li estis arestita tiun saman nokton. Li silentis. Li ne demandis kial. Post liberiĝo li serĉis la plej malfacilajn taskojn, sed li silentis.

“Pli malfacile ol la laboro mem estis ĝin trovi—li silentis.

“Baninte sin en malvarma ŝvito, kunpremita sub plej peza ŝarĝo dum la plej

severa tordado de la malplena stomako—li silentis.

“Li neniam kalkulis kiom pudojn da ŝarĝo po unu kopeko, kiel ofte li falis dum tri-kopeka iro, kiel ofte li preskaŭ elkraĉis sian animon petante sian perlaboron (li kalkulis nek sian sorton nek ies alian—nur silentadis).

“Sian propran perlaboraĵon li laŭte ne petis, kiel almozulo li starigis sin ĉe la pordo, en la okuloj pentriĝis hunda petaĉo, ‘alvenu poste,’ kaj li malaperis kviete kiel ombro ke li povu iom poste pli kviete elalmozpeti sian perlaboraĵon.

“Li silentis eĉ kiam oni fripone iom deprenis de lia perlaboro aŭ donis al li falsan moneron.

“Li ankaŭ silentadis—”

“Pri mi do, pri mi oni paroladas”, konsolis sin Bonĉjo.

“Unufoje,” daŭrigas la defendanto, post trinko de akvo, “en lia vivo ŝanĝo okazis, traflugis kaleŝo sur kaŭĉuka radaro kun timigitaj ĉevaloj. La veturigisto jam de longe kuŝis sur la pavimo kun diskrevinta kapo. El la buŝoj de la timigitaj ĉevaloj spruciĝis la ŝaŭmo. El sub la hufferaĵoj eksaltas fajreroj. La okuloj brilegas kiel brulantaj torĉoj kaj en la kaleŝo nek morta nek viva sidas homo. Kaj Bonĉjo ekkaptis la ĉevalojn. La savito estis riĉulo, grandanima almozdonanto, kaj ĉiam memoris tiun favoron.

“Li donis al Bonĉjo la vipon de la mortigito. Bonĉjo fariĝis veturigisto kaj pli ol tio, li edzigis sin, eĉ pli ol tio, li prizorgis sin kun infano—kaj li ankoraŭ silentadis.

“Ho! estas mi, estas certe mi,” plifortiĝas Bonĉja opinio, ankoraŭ ne havante la kuraĝon levi siajn okulojn al la ĉiela tribunalo. Li daŭrigas aŭskulti al la defendanto.

“Li eĉ silentadis kiam lia bonfarulo bankrotis kaj ne pagis al li lian perlaboron.

“Li silentadis eĉ kiam la edzino forkuris de li, lasante suĉantan idon sur liaj brakoj.

“Li silentis dek kvin jarojn poste kiam la infano elkreskis kaj fariĝis sufiĉe forta por elĵeti Bonĉjon el la domo.”

“Estas pri mi,” ĝojigis Bonĉjo.

“Li eĉ silentis,” denove komencas defendanto per funebra voĉo, “kiam la sama grandanimulo kvitiĝis de ĉiuj kreditoroj sed eĉ unu kopekon ne donis al li,—kaj eĉ kiam li Bonĉjon (denove veturante per kaleso kun kaŭĉuka radaro) faligis lin.”

“Li silentadis kaj rifuzis elmontri al la policaro la personon kiu lin tiel vundis. Li silentis eĉ en la malsanulejo kie kriegi estas jam permesite. Li silentis eĉ kiam la kuracisto rifuzis sen kvindek kopekoj alproksimiĝi al la lito kaj la gardisto rifuzis ŝanĝi lian tolaĵon sen kvin kopekoj.”

“Li silentis en sia morta agonio—li silentis je la morto mem.”

“Nenian vorton kontraŭ Dio, nenian vorton kontraŭ homoj.”

\* \* \* \* \*

Bonĉjo denove komencis tremadi tra la tuta korpo. Li scias ke post la defendo komenciĝos la prokurora atako. Kiu scias kion li diros? Bonĉjo mem ne memoris sian vivon. Jam surtere li ĉiuminute forgesis la antaŭon. La anĝelo defendanto ĉion rememorigis al li. Kiu scias kion la prokuroro rememorigos al li?

“Sinjoroj,” komencas akra penetranta voco; sed li ekhaltas.

“Sinjoroj,” li denove komencas iom malpli severe, kaj denove ekhaltiĝas.

Fine oni aŭdas de tiu sama gorĝo preskaŭ dolĉan voĉan. “Sinjoroj, li silentadis; tial mi ankaŭ silentos.”

Kvietiĝas—de la antaŭo ekaŭdiĝas nova mallaŭta tremanta voco: “Bonĉjo, mia infano,” resonas kiel harpo, “mia kara infano, Bonĉjo,” kaj al Bonĉjo alpremiĝas la koro. Li jam estus malferminta la okulojn, sed ili mallumiĝis de

larmoj. Li neniam tiel dolĉe ploris; “mia infano,” “mia Bonĉjo;” de sia propra patrino li tian voĉon, kaj tiajn vortojn neniam aŭdis.

“Mia infano,” daŭrigas la tribunalestro, “ci ĉion elportadis kaj ne plendadis; nenia sana membro, nenia sana osto en ci sen vundo, sen sanga vundo, neniu kaŝita anguleto en via animo kiu ne ellasis sangon, kaj ci silentadis. Tie oni ne komprenis tion, ci eble ne sciis ke ci povis ekkrii kaj de cia ekkrio la pordegoj de Jeriĥo ekstremus kaj eĉ enfalus. Ci mem ne sciis pri cia dormanta potenco. Surtere oni ne rekompencis vian silentemon, ĉar tie estas mondo de falseco, sed jen estas la mondo de vereco; vi estas rekompencota. Ĉin la ĉiela tribunalo ne juĝos; por ci ili nenion ŝparos. Prenu ĉion kion ci volas; ĉio estas cia.”

Bonĉjo la unuan fojon levas la okulojn. Li fariĝas preskaŭ blindigata. Ĉio brulegas, ĉio fulmas, de ĉio elŝutiĝas radioj. Li delasas la lacajn okulojn.

“Vere?” li hontiĝinte demandis ŝancele.

“Certe,” respondas la tribunalestro, “certe mi diras al ci, ĉio estas por ci; ĉio en la ĉielo apartenas al ci, ĉar ĉio kio brulegas tie ĉi estas nur rebrilo de via animo; ci prenas nur cian proprafon.”

“Vere?” denove demandas Bonĉjo jam per pli konfidema voĉo.

“Vere,” “vere,” “vere,” de ĉie alvenas la respondo.

“Nu! Se estas tiel,” ridetas Bonĉjo, “mi deziras ĉiumatene varman bulkon kun freŝa butero!”

La ĉiela tribunalo kaj la anĝeloj delasis siajn okulojn ekhontiĝinte.

La prokuroro ekridegis!!!



*Fino. Malvarmo.*—Ĉu ne estas ridinde nomi tiel malbelan knabinon Stella?

*Sro. Varma.*—Stella signifas stelon. Eble ŝi estas tiel nomita pro tion, ke ŝi estas bela en la mallumo.

# EN ESPERANTA RITMO

## SOPIRO JE LA HEJMO

H. LINCKE

Kial ree, ho! Memoro,  
 Refreŝigi la pentraĵon—  
 La pejzaĝo kun la monto,  
 Kie, el la rokofendo,  
 Fluas la plaŭdanta fonto?

Kie ofte mi ripozis  
 En la ombro de la pinoj,  
 Revetante;  
 Dum ĉarmante  
 Kantis la kontentaj turdoj:  
 Ĝis mi ankaŭ, el la pleno  
 De la korlevanta ĝuo,  
 Plektis unu novan kanton,—  
 Kaj la eĥo ĝin ripetis,  
 Dum la birdoj, kaj la fonto,  
 Kaj la pinoj, mirigate,  
 Haltis sian spiretadon.

Kie, en la sunkisataj  
 Lokoj de la montdeklivo,  
 La amindaj lekantetoj,  
 Ensorĉante  
 Ruĝiĝante,  
 Paroletis kaj ridetis.  
 Bela, bela junectempo,  
 Kiun, en la kara hejmo,  
 Mi trarevis kaj trakantis!—  
 Kara hejmo!  
 Mi sopiras cin.

Mi sopiras je la hejmo,  
 Kie vokas mia monto,  
 Kaj murmuris mia fonto,  
 Kaj ĝemetas ĉiu floro,  
 Kaj kantetas ĉiu birdo:

Kiam, ho! amiko, kiam  
 Tien ĉi revenos ci?  
 Tie ĉi retrovus ci  
 La perditan kortrankvilon  
 Kaj la forgesitan kanton.

Mi sopiras je la hejmo  
 Aŭdu, Sorto! Mia koro  
 Petas nur por unu horo  
 Kun la floroj en la hejmo,  
 Kaj la birdoj,—  
 Unu vago sur la monto,  
 Unu trinko el la fonto—

Unu horo!  
 Unu unuobla horo!  
 Ĉu ĝi venos, koro?

---

## LA PLUVA TAGO

(Read at the Esperanto Convention.)

La nuboj malgajaj surkovras ĉielon,  
 Sed estas egale al mi,  
 Ĉar mi supertenas por ŝi  
 La mian ombrelon.

La pluvo nun malrigidigas amelon  
 En mia kolumo, sed mi  
 Eĉ ĝojas, tenanta por ŝi  
 La mian ombrelon.

La koto glatigas ja ĉiun kahelon  
 Ĉi tie en strato sub ni  
 Sed mi supertenas por ŝi  
 La mian ombrelon.

Mi sentas la pluvon jus kiel mielon,  
 Karese falantan sur ni,  
 Ĉar mi supertenas por ŝi  
 La mian ombrelon.

Ĉu nun vi demandas la veran kialon  
 De koro ĝojanta en mi,  
 Jen estas,—mi tenas por ŝi  
 La mian ombrelon.

—Ivy Kellerman.

# Forlasita.

Esperantigis H. LINCKE.

H. LINCKE.

*Malrapideta, kun senteco.*

*m.f.* *cresc.*

1. L' ed - zi - gon ni fik - sis Por la fru - a aŭ - tun'  
 2. Do al la pre - ĝe - jo Sen vi i - ras mi,  
 4. Kaj pa - ce vi dor - mas, Dum mi, ho ve! mi,

*cresc.* *dim.* *Fine.*

Kaj ĉu vi, ho Man - jo, For - la - sis mi nun?  
 Kaj ti - e, tut - so - la, Mi plo - ras pro vi.  
 Kon - sci - as kiel so - la Mi es - tas sen vi.

*p*

3. En om - bra tom - be - jo Ni me - tis vin for, Ja

*cresc.* *cresc. f D. C. al Fine.*

vin, mi - a Man - jo, Mi - a nu - ra tre - zor'.

## P A Ĝ O M A L S E R I O Z A

*Sino. Aĉetemo.*—Mi volas iri aĉetadi hodiaŭ, karulo, se la vetero estos favora, kaj bezonos monon. Kion diras la ĵurnaloj?

*Sro. A.*—Ke pluvos, hajlos, neĝos kaj blovegos.

